## ĈAPITRO II-2

## INFANO EN BJALISTOKO

Tiun plian oficon oni komisiis al li pro lia rimarkinda kono de fremdaj lingvoj; sed la pedagoga tasko pli taŭgis laŭ lia naturo. Pri geografio li publikigis en la rusa lingvo tre praktikajn lernolibrojn.

Per ĉiutaga senripoza penado la gepatroj sukcesis havigi al siaj infanoj plenan edukon en la gimnazio kaj universitato. Tri fariĝis iam kuracistoj, kaj unu farmaciisto.

Saĝa kaj severa estis la patro, viro skeptika je revoj, sed obstina je laboro. Religian kredon li havis nur unu solan, nome plej fidelan akuratecon al la devo ĉiutaga.

Dolĉan anĝelan naturon havis la patrino. Bonkora, sentema kaj ĉiel modesta, ŝi tutkore sin donis al siaj infanoj kaj al sia mastrumado. Blinde fidema je la saĝo kaj justeco de la edzo, ŝi tamen klopodis moligi liajn juĝojn en okazo de puno.

Kiam eliris el patra skriboĉambro malfeliĉa kulpuleto, li preskaŭ ĉiam renkontis survoje, kvazaŭ hazarde, la patrinon preta por lin ankaŭ ”severe” admoni, dum ŝi glatis lian kapeton kun larmoj en la okuloj. ”Plej certe ŝia kispuno pli efikis ol la mano de la patro”, skribis unu el la fratoj de Ludoviko multajn jarojn poste. ”Kiam unu el ili restis sen tagmanĝo laŭ ordono patra, nevidebla anĝelo-zorganto sendis al li porcion pere de maljuna kuiristino, dum la posttagmeza dormeto de la familiestro, kaj ĉiam kompreneble nur hodiaŭ por la lasta fojo[1]”.

1 El privata letero de Feliks Zamenhof.